



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2017 (209)

22. 3. 2017

La plej granda Esperanto-flago en Ĉeĥio



La 18-an de februaro 2017 E-mental' oficiale prezentis novan Esperanto-flagon, kiu estas la plej granda en Ĉeĥio. Kun iom oficiala ceremonieto ĝi estis prezentita dum aranĝo *3-a Tosto por Zamĉjo* en moravia urbeto Litovel. Grandan dankon al Veronika Venislovas kaj Vít Guiglielmo Mišurec, kiuj sukcesis aĉeti ĝuste verdan ŝtofon, lavis la ŝtofon, tondis, kreis stelon, kudris, gladis...por ke E-mental' havu tiom belegan flagon!

EL LA ENHAVO

Aktualaĵoj	2
Ĉi-jaraj novaĵoj de KAVA-PECH	5
Zamenhofa jubileo	7
Palaco Europa – „nova koro“ de la EU	8
Vivo de Zamenhof	14
La vojo	21
Sto let od narození Arnošta Kavky	22

Klub esperantistů v Praze

<http://bulteno.cs-retromusic.net>
Schůzky v ul. Ve Smečkách 25
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček
t.brichacek@seznam.cz

Lingvaj korektoj: Pavol Petřík kaj
Markus Beyer.

Tostoj por Zamenhof

Ĉar jaro 2017 estis proklamita kiel Jaro de Zamenhof, E-mental' organizas serion de aranĝoj nomitaj *Tosto por Zamĉjo*, kiuj okazos dum tuta jaro en diversaj lokoj de Ĉeĥio.

Dum la unua jarkvarono oni tiel jam tostis en Hradec Králové, Plzeň, Litovel, Ústí nad Labem kaj Beroun.

Por havi informojn, kie kaj kiam okazos venontaj *Tostoj*, sekvu la paĝaron www.e-mental.cz

Jazykové semináře pro pokročilé

V klubovně Ve Smečkách 25 probíhají jazykové semináře pro pokročilé esperantisty, které vede Petr Chrdle. První seminář proběhl 23. února, druhý 23. března. Prodrobnosti sledujte na stránkách České esperantské mládeže <http://mladez.esperanto.cz>.

Slovly organizátorů: „*Se vi volas plibonigi vian lingvan nivelon de Esperanto, tiu ĉi seminario estas taŭga por vi. Ni babilos, klarigos iun ajn problemojn konektitaj kun via Esperanto per interesaj metodoj. Se vi ne scipovas ion en Esperanto, nur demandu, kaj ĉio estos klarigita al vi.*“

Kniha *Unie ve víru migrační krize*



20. prosince 2016 vyšla kniha Tomáše Břicháčka *Unie ve víru migrační krize*. Tématem knihy je Evropská unie (její instituce a politické a intelektuální elity) jako aktér i faktor migrační krize, a její schopnost na krizi adekvátně reagovat. Kniha je rozdělena do čtyř částí s názvy Účet za Evropu bez hranic, Ideový přístup unijních elit

k migrační krizi, Unijní recepty na řešení krize a Časová osa – milníky evropské migrační krize. Autor publikaci představil 14. února 2017 v pražském Autoklubu na semináři, který moderoval Václav Klaus.

Květa Krajíčková v televizní soutěži (z Facebooku, 24. 1. 2017)



Vlasta Celá sdílel(a) odkaz ve skupině: E-mental'

24 leden -

Nia kara prezidantino de registaro Květa hodiaŭ kuraĝe konkursis en Ĉeĥa televido! Ŝi ne forgesis paroli ankaŭ pri Esperanto! Aŭdeblas tio ekde 10:35! 😊



Kde domov můj? — Česká televize

Zábavná vědomostní soutěž zaměřená na znalosti o naší vlasti. Moderuje Aleš Háma. Režie Z. Fiala

CESKATELEVIZE.CZ

Pasintaj aranĝoj

- 21/01/2017 – E-mentala socia aranĝo 1-a tosto por Zamĉjo en Hradec Králové
- 28/01/2017 – E-mentala socia aranĝo 2-a tosto por Zamĉjo en Plzeň
- 03/02/2017 – E-mentala socia aranĝo 3-a tosto por Zamĉjo en Litovel
- 09/02/2017 – Jan Šebetovský prezentis malnovajn filmojn el E-aranĝoj malkovritaj en la ŝranko en la klubejo (*klubejo*)
- 23/02/2017 – prelego de Lucie Karešová pri Viktor Emanuel Frankl (*klubejo*)
- 23/02/2017 – 1-a lingva seminario de Esperanto por aktivuloj (*klubejo*)
- 25/02/2016 – tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental en la praga bestĝardeno kun festo de la „adoptotago“ kaj granda konkursa pikniko
- 04/03/2017 – E-mentala socia aranĝo 4-a tosto por Zamĉjo en Ústí nad Labem
- 09/03/2017 – prelego de Tomáš Břicháček pri la nova palaco *Europa* en Bruselo
- 17-19/03/2017 – E-mentala socia kaj gastronomia aranĝo 11-a *BIERo* en Náchod
- 23/03/2017 – 2-a lingva seminario de Esperanto por aktivuloj (*klubejo*)
- 23/03/2017 – eldonita Bulteno No. 1/2017

Venontaj aranĝoj

Kunvenoj

APRILIO: la 6-an kaj la 20-an

MAJO: la 4-an kaj la 18-an

JUNIO: la 1-an kaj la 15-an

Kunvenoj komenciĝas je la 17-a horo.

Programo de la kunvenoj estos prezentata en niaj interretaj paĝoj <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

26/03/2017 – okazos E-mentala socia aranĝo *5-a tosto por Zamĉjo* en Beroun

08/04/2017 – okazos E-mentala socia aranĝo *6-a tosto por Zamĉjo* en Lipník nad Bečvou

28/04-01/05/2017 – okazos junulara aranĝo *4-a Centrejo* en Bartošovice

Detaloj pri E-mentalaj aranĝoj ĉe <http://www.e-mental.cz>.

En aprilo kaj majo okazos denove la agado *Traduka printempo*. Volontuloj povas traduki interesajn literaturajn tekstojn por la somera Bulteno. Informoj ĉe Tomáš Břicháček, t.brichacek@seznam.cz.

Centrejo



Ekde la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2017 okazos en Bartošovice en norda Moravio junulara aranĝo *4-a Centrejo*. Detaloj ĉe <http://centrejo.esperanto.cz>.

La aranĝo estos plena je interesaj programeroj: prelegoj, trejnadoj, ekskursoj, manlaboroj, ni renkontiĝos kun sorĉistinoj, ni ekscios, kiu estas pli bona, ĉu ĈEJ aŭ SKEJ, ni plibonigos niajn lingvokonajn dum kursoj de Esperanto, vi povas eĉ ĝojatendi ludojn, diskejon kaj karaokeon. Kaj plejparto de tio okazos en la belega kastelo Bartošovice, kie ni ankaŭ loĝos. Se vi jam aliĝis, vi povas ege ĝojatendi la aranĝon! Se vi ankoraŭ ne aliĝis, faru tuj, lokoj ne estas senfinaj!

Ĉi-jaraj novaĵoj de la eldonejo KAVA-PECH

Petr Chrdele

Antaŭ ol prezenti la novaĵojn skribitaj en Esperanto mi menciu ĉeĥan verkon, tamen firme ligitan al Esperanto. Ne nur, ke ĝin verkis sperta esperantisto, Prof. d-ro Vlastimil Novobilský, sed kiel montras jam la titolo *František Vladimír Lorenc. Svědectví o životě a díle neobyčejného člověka*, la libro priskribas la vivon kaj verkon de la unua ĉeĥa esperantisto kaj eĉ aŭtoro de la unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto. Li tamen famiĝis nur en Brazilo, kien li fuĝis antaŭ minacata malliberigo pro liaj kontraŭhabsburgaj agadoj en *Omladina*, kaj ankaŭ por eviti la trijaran soldatservon en aŭstria armeo. Li vivis modestan vivon de agrikulturisto kaj instruisto, kaj precipe filantropo. Kun sia edzino li havis 13 infanojn kaj krome adoptis plurajn aliajn, inter ili ankaŭ nigrulinon. Lorenc famiĝis kiel poligloto scipovanta aktive minimume 104 lingvojn inkluzive de kelkaj indianaj, estis verkisto, tradukisto, naturkuracisto kaj por spiritistoj ankaŭ mediumo. En Brazilo estas laŭ li nomataj Lingvistika Instituto, granda eldonejo, biblioteko en la urbo Dom Feliciano kie li vivis, kaj tie li havas ankaŭ monumenton.

La libro estas jam tradukata fare de Margit Turková kaj espereble en proksima tempa horizonto ĝi aperos ankaŭ en Esperanto.

Mi eldonis ĉi-jare en Esperanto ĝis nun du librojn, kiuj estas ambaŭ ligitaj al la ĉeĥa historio. *Heredantoj de Silentado* fare de Sabine Dittrich estas romano, kies fabulo respegulas la komplikajn rilatojn inter germanoj kaj ĉeĥoj en la tempo post la 2a mondmilito. Junan judan germaninon, kiu volas ekscii ion pri siaj antaŭuloj, gvidas ŝia esploro al Prago. Tie ŝi ne nur renkontas amon al simpatia ĉeĥa instruisto, sed pere de ties gepatroj, kaj ankaŭ en sia germana ĉirkaŭaĵo, ŝi ekkonas la malnovajn historiajn vundojn kaj la restantajn gutojn de malamo. Kiel konfesas la aŭtorino, ĉiuj priskribiaj okazaĵoj reale okazis, ŝi nur kumulis ilin al unu romanece prilaborita rakonto. Finen de la libro la aŭtorino aldonis koncizan historian trarigardon de la rilatoj inter germanoj kaj ĉeĥoj sur la teritorio de Ĉeĥio. Ĝi estas kompletigita per mapo de Ĉeĥio kun la indiko de la regionoj kun plejparte germanlingvaj loĝantoj. El la germana originalo *Erben des Schweigens* ĝin tradukis Aleksandro Montanesko, kio estas pseudonimo de tre sperta germana esperantisto.

Eble estas interesa ankaŭ la fono de ĉi tiu Esperanto-eldono. Kiam mi ricevis donace la libron, mi volis ĝin nur trarigardi, ĉar mi legis lastan fojon libron en la germana antaŭ eble 40 jaroj. Sed ĝi tiom kaptis mian atenton, ke mi tralegis ĝin komplete kaj tuj petis pere de la aŭtorino la germanan eldonejon *Neufeld Verlag* pri la kopirajto, tamen por la ĉeĥa eldono, ĉar mi volis, ke ĝi estu konatebla por ĉeĥoj. Bedaŭrinde ĝin mi ne povis ricevi, ĉar la kopirajton por la ĉeĥa versio jam estis kontraktita al la eldonejo *Mladá fronta*. Nur post tiu malsukceso mi pripensis, ke la temo estus eble interesa ankaŭ por la internacia legantaro kaj decidiĝis peti la kopirajton por la eldono en Esperanto, kiun mi senprobleme ricevis, kaj eĉ sukcesis eldoni la libron pli baldaŭ ol *Mladá fronta* en la ĉeĥa. Tamen, laŭ la informo de la aŭtorino, ankaŭ la ĉeĥa versio devus aperi ĉi-jare.

La dua ĉi-jara libro eldonita en Esperanto estas *Spirita revolucio en la koro de Eŭropo* kun la subtitolo *Rigardo en la historion de la ĉeĥa nacio* fare de Přemysl Pitter. Unue eldonis ĝian germanan version en la jaro 1968 la svisa eldonejo *Rotapfel-Verlag*, kaj nur sekve, ses jarojn pli poste, aperis ĝia ĉeĥa versio en la eksila eldonejo *Konfrontace* en Zuriko, ĉar Přemysl Pitter estis en Ĉeĥoslovakio *persona non grata* kaj por la eldono en Ĉeĥio la verko devis atendi ĝis post la velura revolucio. La libro estas verkita en la formo de galerio de elstaraj personoj en la ĉeĥa historio kaj ĝi prezentas fundamentojn de la ĉeĥa spirita tradicio - la tradicio de humanismaj idealoj. Ĝi estas rezulto de la tutviva intereso de la aŭtoro pri la ĉeĥa historio. Pitter en ĝi konfirmas la aserton de la ĉeĥa historiisto el la 19a jarcento František Palacký, ke „Kiam ajn ni venkis, ĉiam tio okazis per la forto spirita, ne fizika“. En la kristanisma kaj humanisma tradicio li vidas ankaŭ bazon por la renovigo dum la „Praga printempo“ en la jaro 1968 kaj la forton montritan dum la rezisto kontraŭ la okupaciaj armeoj, same kiel esperon je la venko kontraŭ la totaleca potenco en Ĉeĥoslovakio (kiun li ne ĝisvivis). La verkon tradukis Margit Turková kaj ilustris ĝin Milada Broumová.


Mi ne volonte mencias la eldonplanojn, pro ĉiama danĝero, ke io povas malhelpi ilian realigon. Tamen, inter ili estas tri jam tiom maturaj, ke mi kuraĝas anonci ilian aperon ankoraŭ en 2017: Krom la jam menciita Esperanto-versio de F. V. Lorenc temas pri Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro de Miroslav Malovec. Inter liaj kunlaborantoj dum la finredakto estas ankaŭ membroj de KEP Jindřich Košťálek kaj Zdeněk Pluhař. La tria ĉi-jare eldonota libro estas en la ĉeĥa, sed kun forta ligo al Esperanto, nome la ĉeĥa versio de la libro de Jaroslav Karhan *La Vojo al Harmonio*, kiu konservas la titolon kaj subtitolon kaj do aperos kiel *Cesta k harmonii. J. A. Komenský – L. L. Zamenhof*.

Fine mi devas ĝoje konfesi, ke mi subtaksis la intereson pri la libro de Martin Stuppnig eldonita pasintjare kaj okazis miraklo: La tuta stoko estas post malpli ol unu jaro preskaŭ disvendita kaj restas proks. 30 lastaj ekzempleroj.

La ĉeĥlingvajn novaĵojn, same kiel ĉiujn ceterajn eldonaĵojn de KAVA-PECH, oni povas ekscii ĉe <http://kava-pech.cz>.

www.kava-pech.cz

chrldle@kava-pech.cz



100 let od úmrtí Zamenhofa



*14. dubna si připomínáme 100. výročí úmrtí
Ludvíka Lazara Zamenhofa.*

UNESCO k Zamenhofovu výročí

100th anniversary of the death of Ludwik Zamenhof, physician and linguist (1859-1917) (with the support of Germany and Slovakia) (2017)

Born inside the multinational community of the city of Białystok, L. Zamenhof (1859-1917) created the first version of his Lingwe Uniwersala already at a young age. In 1885 Zamenhof decisively finished his project of the international language as we know it today. In 1887 he published a textbook in Russian: „The international tongue – Preface and complete method”, under the pseudonym Doktoro Esperanto. The pseudonym means „The Doctor who hopes” and has caught on as the name of the language. In the same year the textbook was published in Polish, French, German and English.

The first Esperanto clubs started to come into being, and the advantages of the language were recognized by linguists too. In 1905 in Boulogne-sur-Mer, France, the first World Congress of Esperanto took place. While staying in France, Zamenhof was decorated with the National Order of the Legion of Honour. In 1906 Zamenhof published humanitism (homaranismo), which is the idea of the union of all the nations communicating in a common language. The Esperanto movement he initiated has spread all over the world, while the creator released all his rights, liberating Esperanto for every human’s use. The work of L. Zamenhof is known worldwide reaching over 120 countries. The idea of a common language has fascinated many people and lots of them made similar attempts at creating one, but Zamenhof’s case is the only one to have achieved world success.

<http://en.unesco.org/celebrations/anniversaries/2017/all?page=1>

LITERATURAJ KAJ KULTURAJ PAĜOJ

Palaco Europa – „nova koro“ de la Eŭropa Unio

Tomáš Břicháček

Komence de la jaro oni inaŭguris en Bruselo palacon *Europa*, kiu iĝas la nova ĉefa sidejo de la Eŭropa Konsilio, ĝia prezidanto (tiel nomata „eŭroprezidento“) kaj de la Konsilio de la EU. La ekstravaganca konstruaĵo simila al grandega ovo en kaĝo estos interalie okazejo de uniaj sumitoj, kunsidoj de ministroj kaj fakaj traktadoj. Ĝi estos nova centro de decidaj procesoj sur la nivelo de la Unio kaj ankaŭ unu el uniaj neoficialaj simboloj (ankaŭ pro tio, ke ambaŭ du organoj instalitaj ĉi tie ankoraŭ dum la konstruo ekuzis motivon de la palaco en sia nova emblemo). En unu oficiala propaganda filmeto ĝi estas prezentata kiel „nova koro“ de la EU.



Historio de la projekto kaj kostoj

Oni decidis pri la konstruo en la jaro 2004 dum la entuziasma etoso, kiu dominis en la epoko de la vastiĝo de la EU je dek novaj membroŝtatoj kaj de la genezo de la eŭropa konstitucio. Ĝistiaman sidejon de la Konsilio de la EU – kolosan komplekson *Justus Lipsius* kun sia surfaco de 227 278 kvadratmetroj – la favorantoj de la nova projekto prezentis kiel tro malgrandan por la pli multa grupigo de ŝtatoj kaj nesufiĉanta por la kreskanta nombro de sumitoj, pro kiuj ĝi laŭdire en la periodo de sia ekesto tute ne estis planita. Ne lastloke tie ekzistis ambicio trovi reprezenteban sidejon por la nova „prezidento“ de la EU, kiun la nova eŭropa konstitucio planis krei.

Konkurson en la jaro 2005 venkis projekto de la belga arĥitekto Philippe Samyn kaj lia studio. Preparaj laboroj komenciĝis en la jaro 2008. La konstruado mem startis en la jaro 2011, t. e. en la epoko, kiam erupciis la ŝulda krizo kaj koneksaj

ŝparigaj rimedoj en multaj membroŝtatoj, kaj kiam centmilionaj elspezoj pro superba palaco malfacile estis klarigeblaj. Cetere dumtempe montriĝis, ke la konstruaĵo *Justus Lipsius* plene sufiĉas al la bezonoj de vastigita Unio kaj senprobleme kapablas gastigado de sumitoj, kiuj ĝuste dum la ŝulda krizo estis tre oftaj. La prezidento de la Eŭropa Konsilio mem kun sia kabineto enlokiĝus en kelkajn oficejojn. Tamen neniu havis forton haltigi la movantan trajnon. Tiu do rulfalis inter pluraj dramaj okazintaĵoj (peripetioj ĉirkaŭ la bankrotanta Grekio, la migra krizo, la brita referendumo) ĝis sukcesa kompletigo de la projekto en momento, kiam la etoso en Bruselo ne estas sufiĉe gajega por agordi kun inaŭgurado de dekoraj monumentoj.

Kostoj de la konstruado fine atingis 321 milionojn da eŭroj, t. e. ĉirkaŭ 8,66 miliardoj da kronoj. Tio povas ŝajni grandega sumo, tamen inter elspezoj pro funkciado de uniaj organoj ĝi tute ne estas elstara. Ekzemple la Eŭropa Parlamento pasintjare glutis (subtrahinte proprajn enspezojn de ĉi tiu organo)

1, 686 miliardoj da eŭroj, t. e. ĉirkaŭ 45,5 miliardoj da kronoj – kio paranteze larĝtrajte egalas kostojn de la konstruado de la tunela komplekso Blanka. Simile en la jaro 2015 tiu sumo estis 1,646 miliardoj da eŭroj.

Aspekto kaj parametroj de la konstruaĵo



La palaco en formo de kubo estiĝis kiel kunigo de rekonstruita bloko A de la komplekso *Résidence Palace* el la fino de la 20-aj jaroj de pasinta jarcento kaj ampleksa moderna alkonstruaĵo.

La kerno de la 11-etaĝa konstruaĵo estas giganta skeleto, kiu similas al ovo aŭ piro, kiu laŭ oficiala ekspliko

reprezentu lanternon. Vespere kaj nokte ĝi estas lumigita kaj brilas trans vitraj fasadoj de la palaco al la strato Rue de la Loi. La ovon ĉirkaŭas du duoblaj vitraj vandoj, kiuj antaŭ ĝi kreas grandan atrion. Ĝin kompletigas la malnova konstruaĵo kaj al ĝi nove alkonstruita malvasta unueca alo, en kiun la ovo sude enkreskas.

La ovo estas dividita je elipsaj etaĝoj, kiuj larĝiĝas kaj poste mallarĝiĝas. En la tri plej grandaj en la mezo troviĝas tri grandaj kunsidaj ĉambregoj – la plej granda el ili (en la 4-a etaĝo) por sumitoj. En la aliaj estas malpli grandaj kunsidaj ĉambroj, sociaj ejoj aŭ preskonferenĉejo. En la teretaĝo estas kafejo kaj sub ĝi granda restoracio.

La duopo de eksteraj vitraj muroj estas kovrita de mozaiko de 3750 recikligitaj lignaj fenestraj kadroj. Ili devenas el ĉiuj 28 membroŝtatoj, kie laŭdire oni

kolektis ilin ĉe detruoj kaj rekonstruoj de domoj. Trans tiu artefakto la ovo dumtage el la strato praktike ne videblas. Ĝi montriĝas nur post krepusko, kiam ĝi estas lumigita.

La tuta plata tegmento de la konstruaĵo estas kovrita de solaraj paneloj. Ankaŭ estas tie rezervujo por pluva akvo, kiu estas uzota en necesejoj.

Signifa elemento de la konstruaĵo, antaŭ ĉio ene de la ovo, estas vivega kolora dekoracio, kies aŭtoro estas la belga artisto Georges Meurant. Ĝi konsistas el sate koloraj kvadratoj. Ili kovras interalie plafonojn kaj densajn lanajn tapiŝojn en kunvenaj ĉambroj kaj liftaj ŝaktoj.

Kolora dekoracio al mi kaj al aliaj observantoj, kun kiuj mi povis paroli, aspektas kiel ĉambreto de juna knabino aŭ al antaŭlernejo.

La surfaco de la konstruaĵo estas 70 646 kvadratmetroj, do kompare kun la komplekso Justus Lipsius proksimume triono. Krom kunsidaj ĉambregoj kaj aliaj menciitaj spacoj tie troviĝas proksimume 250 oficejoj inkluzive de spacoj por la kabineto de la prezidanto de la Eŭropa Konsilio, kiu troviĝas tute supre en la 11-a etaĝo.

Kun la komplekso Justus Lipsius la palaco Europa estas ligita per du paŝpontetoj.



Simboliko, idea fono

Ekde la komenco oni parolas pri tio, ke la konstruaĵo havas grandan simbolikan valoron. En propagandaj tekstoj de uniaj organoj kaj en deklaroj de arĥitekto Samyn oni povas observi kelkajn liniojn:

Unualoke la konstruaĵo devas reflekti la koncepton de daŭripova disvolviĝo, se temas pri uzitaj materialoj kaj teĥnologioj. Tio videblu ekzemple pro la uzo de recikligitaj fenestraj kadroj sur la vitraj fasadoj, pro la solaraj paneloj kaj pluvrezervujo sur la tegmento aŭ pro tio, ke lumigo, humideco kaj temperaturo ene de la konstruaĵo laŭdire estas reguligitaj per alte efika teĥnika ekipaĵo ŝparanta energion aŭ pro tio, ke „la skeleto de la fasado estas optimigita tiel, ke eblis redukti la kvanton de uzita ŝtalo je 30 % kompare kun la tradicia solvo“.

Uzo de malnovaj fenestraj kadroj el 28 ŝtatoj krom la idealo de reciklado laŭdire samtempe simboligas la unian moton „Unueco en diverseco“ kaj devas „vidigi la metian lertecon kaj kulturan diversecon de la EU“.

La konservado kaj restaŭrado de la historia *Résidence Palace* esprimu „preferon por permanenta kaj daŭripova arĥitekturo“.

La arĥitekto Philippe Samyn argumentas, ke la konstruaĵo simboligu ĉion plej bonan, kion la eŭropa integrado kunportas. Homoj laŭ li ne bone konscias la bonon, kiun la Eŭropa Unio alportas. Fundamenta en tiu senco estas laŭ li la simboliko de la lanterno. – Laŭ tiuj citaĵoj povus ŝajni, ke la celo estas prezenti la Union kiel lumon, kiel bonon, kiu (el la lanterno) al ni ĉiuj brilas.

Samyn ankaŭ diras, ke li volis krei ĝojplenan lokon por renkontiĝado. La ideo estis starigi „virinan“, kolorriĉan („jazzy“) konstruaĵon, kiu kontrastos kun harda, pli vira arĥitekturo de plimulto de sidejoj de uniaj organoj.



Konkludaj rimarkoj

La konstruadon de la palaco *Europa* mi jam komentis antaŭ kelkaj jaron en la artikolo *Van Rompuyovo vejce v kleci za miliardy*.¹ Mi parolis pri paraleloj inter tiu ĉi kreaĵo kaj la palaco de Ceaușescu en Bukareŝto (kiujn trovis ankaŭ Benjamin Kuras).

Rumunský diktátor Ceaușescu v posledních letech své vlády, bez ohledu na to, že hospodářská situace země byla bídná a jeho poddaní už doslova hladověli, věnoval enormní prostředky na stavbu obrovského paláce v centru Bukurešti, který se měl stát sídlem nejdůležitějších orgánů státu. Palác měl oslňovat svou monumentálností a stát se nesmrtelným památníkem jedné éry. Ceaușescu ani jeho režim se dokončení enormně nákladné a zbytečné stavby nedočkal. Palatul parlamentului jako tichý památník starých časů dnes vévodí novému Rumunsku.

Jiná doba, jiný režim, ale zase se staví další palác. V Bruselu už roste do výšky kolos s nenáročným názvem Europa, který se má stát středobodem celé Unie, totiž

¹ Blog IDNES.cz [13. 9. 2012].

sídlem Evropské rady a jejího předsedy neboli tzv. „prezidenta“ EU. Má mít 53 000 m2 užité plochy nad zemí a 17 000 m2 pod zemí. Má jít o oslnivou a super ekologickou stavbu.

Paralely s Ceaușeskovým Rumunskem jsou pozoruhodné. V době závažné dluhové krize se investují částky v řádech miliard korun (náklady se odhadují na nejméně čtvrt miliardy eur) na megalomanský projekt, který je přitom zcela zbytečný. Zasedání Evropské rady zatím v Bruselu probíhala bezproblémově v sousední obrovské budově Justus Lipsius, která je sídlem Rady EU, a která pro účely unijních summitů kapacitně naprosto dostačuje. Samotný předseda Evropské rady se svým personálem by se vešel do několika místností.

V Bruselu ovšem zvítězil názor, že Evropská rada a „europrezident“ potřebuje reprezentativnější zázemí „s vysokou symbolickou hodnotou“ (jak říkají propagační materiály). Pokud jde o onu symboliku, kritický pozorovatel dění v dnešní EU nemůže než souhlasně přikyvovat. Tenhle záměr se opravdu povedl. Šedivý, sterilní, umělý, těžkopádný, odosobnělý vzhled – jakési vejce v kleci – už to samo vystihuje Unii výtečně. Jádro monstra zas vhodně připomíná jícen či kotel, který bude chrlit další a další unijní regulaci a další centralizační iniciativy. Megalomanství, póza ekologičnosti a ekonomičnosti (nikdo neřeší, kolik peněz a energie by se ušetřilo, kdyby ke stavbě vůbec nedošlo a Evropská rada se spokojila s dosavadním zázemím), to vše na EU výborně sedí.

Van Rompuyovo vejce v kleci možná dřív, než si jeho strůjci myslí, bude následovat osud svého bukurešťského kolegy a změní se na památník jednoho málo šťastného projektu světové historie.

Tiuj komentoj validus ankaŭ hodiaŭ. Tamen mi devas konfesi, ke dume en la kunteksto de multe pli gravaj okazintaĵoj kaj ĉefe konkreta agado de uniaj organoj (rilate al la ŝulda kaj migra krizoj aŭ hororigaj iniciativoj kiel ekzemple la eŭroprokuratoro, virinaj kvotoj ktp.), mi moderigis mian opinion. Nenocan vantano ĵetadon de eŭroj por konstrui reprezentablajn sidejojn mi al uniaj organoj volonte pardonis, se la integrado entute kondukis bondirekten, kaj alportus plejparte pozitivajn rezultojn, kiel tio estis en pasinteco, antaŭ ol la projekto mergiĝis en nunan multnivelelan averion, kiu rezultas el tro da centralismo kaj maldekstro-liberala progresismo.

El la estetika vidpunkto decas rekoni, ke la konstruaĵo estas almenaŭ originala kaj diferencas de griza rutino de aliaj sidejoj de uniaj organoj. El iuj anguloj ĝi aspektas pli bone, ol ĝi povus iam ŝajni laŭ desegnaĵoj. Kiel relative agrabla ŝajnas al mi la atrio kun ovo, kiam oni observas ĝin en la interiero. Male ege negativan impreson lasas al mi la „virino-infaneca“ (kiel oni povus nomigi ĝin) kolora dekoracio, kiu estas sufiĉe ĝena, eĉ nervoziga.

Estas interese mediti pri la oficiale prezentitaj direktoj de la simboliko de la konstruaĵo kaj kompari ilin kun la ideo fono de historiaj monumentoj de unuopaj eŭropaj nacioj (ekzemple nia Nacia teatro). Se la Unio baziĝas ĉefe sur la koncepto de daŭripova disvolviĝo, unueco en diverseco kaj prezentado de si mem, mi pensas, ke tio plene montras, ke sur tia bazo la konstruado de kuna eŭropa identeco aŭ eĉ civitaneco estas malfacile imagebla.

En ĉiu kazo la palaco *Europa* estas konstruaĵo, kiu vidindas.

Vivo de Zamenhof

Edmond Privat

Ĉapitro IV. Studentaj jaroj

Post longa kiso de l' patrino la studento forveturis Moskvon. Urbego vasta. Universitato plenega. Brilas Kremlaj turoj. Sur stratoj neĝo blanka. Kuras glitveturiloj, tintadas sonoriletoj. Rapidas ĉevaloj longharaj. Ĉie vivo gaja, vigla. Malriĉe loĝis la junulo. Per lecionoj li gajnetis iom. Sed malfacile juna hebreo trovas eĉ okazojn por instrui. Ankaŭ li verketoj iom por gazeto, la *Moskovskie Viedomoŝti*. Hejme la gepatroj time zorgis. „Nur dek naŭ rublojn mi elspezas en monato“, li skribis por ilin trankviligi. Sed kiel li sin nutris!

Konsciencie li studadis medicinon. Ankaŭ li kliniĝis siavice super korpoj de mortintoj en ĉambrego dissekca. Simpatie li malkovris la internan meĥanisman de la homa formo. Eĉ tie lin sekvadis lia revo. Ĉu ne similaj estas ĉiuj homoj, kun samaj organoj, samaj bezonoj, samaj timoj kaj deziroj dum la vivo? Ĉu lingvaj aŭ koloraj diferencoj ŝanĝas tion? Malkono inter gentoj devus ĉesi.

Li plenumis tamen la promeson. „Por pensadi pri homaro, atendu kelkajn jarojn!“ sonis admono patra. Sed granda malpleno doloris en koro. Kiel vivi sen celo ideala? Lia penso kompatema serĉis materialon. Ĝi sin turnis tiam al suferoj de l' Hebreoj. Legaĵo en ĵurnalo atentigis lin. La cionista revekiĝo lin allogis. Ankaŭ lia gento, kiel ĉiuj, rajtas esti rekonata kaj ŝatata. Kial nur Hebreoj devus kaŝi aŭ prihonti sian naciecon? Ankaŭ ili rajtas havi propran centron de kulturo. Nepoj de Moseo staras ĉie dissemataj. Malfeliĉo premas multajn. Trans maro blua de l' Helenoj kuŝas antikva Palestino. Laborado, kolektado, volo pacienca kondukos al miraklo. Iam eble staros tie sur tero de l' profetoj nova hejmo de l' Hebreoj. Instruejo, kongresejo malfermos siajn pordojn. Kolonianoj ekloĝos en ĉirkaŭo. Nur justa povis esti tia plano. La disa popolo regajnu l' esperon. Eĉ pli juna, Zamenhof jam verkis versojn en la rusa lingvo. Poemon al Hebreoj li presigis nun en la *Ruski Jevrej*:

Al altar' de libereco, fratoj nun rapidu!

Por konstrui propran hejmon ĉiu portu brikon.

Eĉ se multajn jam forŝovos vento, akvo, kaj malsaĝo,

Ne pereos sub la tero via semo kaj laboro.

Vekiĝu, popolo kutima je batoj!

En tia tempo dormo estus honta.

Per ondo forta de l' amaso

Ni svingu flagon al la vivo!

Se riĉuloj pro la oro

Kisas sklave manojn potenculajn,

Ni, malriĉaj, per moneroj de l' laboro

Disbatos la katenojn.

Al altar' de libereco, fratoj nun rapidu . . .

Elokvente sonis alvoko junula. Tamen Zamenhof ne fariĝis iam eĉ gvidanto inter la cionistoj. Ĉia trograndigo pri l' merito de l' Hebreoj lin doloris. Konstanta redirado pri „nacio sankta super ĉiuj“ vundis lian senton, kvazaŭ

ofendado al ceteraj gentoj. Akra mallaŭdo kontraŭ Poloj, Rusoj, aŭ Rumanoj malplaĉis al li. Plendoj pri premantaj registaroj ŝajnis al li pravaj, sed ne malamo al popoloj. Eĉ inter liaj samgentanoj la plej malgranda vorto ŝovinista lin repelis. Ankaŭ la Hebreoj tre bezonis pli proksime koni la ceterajn gentojn. Ankaŭ por ili urĝis lingvo internacia. Ke ili ekkomprenu diferencon inter amasoj kaj sekretaj incitantoj, ke ili sciu historion de l' aliaj: ankaŭ la ceteraj ja suferis, ankaŭ ilin premis potenculoj, ankaŭ ilin ekspluatas malgrandnombro da lertuloj. Hebreoj amu sian Leĝon, sian genton kaj kutimojn, sed ili super ĉio amu la homaron kaj ĝin servu kiel fratoj. Tiel sentis la studento pripensema, kaj revenis al sia revo.

Eĉ la „dek naŭ rubloj“ ne troviĝis tro facile ĉe l' komenco de l' monato, kaj ili ne sufiĉis. Zamenhof ne ŝatis trudi elspezadon al gepatroj. Du jaroj jam forpasis. En somero 1881 li revenis hejmen.


En Varsovio li daŭrigos studadon medicinan ĉe l' Universitato. Al amata la patrino li rakontis pri la pezo de l' promeso al patro. Lia vivcelo restis la sama. Homoj devas refratiĝi. Kie kuŝas la paperoj kaj provaĵoj de la lingvo intergenta? En libertempo li ja povos ilin trarigardi kaj reveni al laboro kara.

Kun larmoj pala sidis la patrino. Ŝi silentis. Ŝia blanka mano dolĉe glatis la kapon de l' granda filo. Jam dudekdujara li estis. Kiel aŭdos li la veron? Unu tagon ŝia edzo ja bruligis liajn manuskriptojn. Saĝa kaj severa, nur pro amo patra li ĝin faris. Li kredis, ke li tiel „savos“ sian filon. Ofte ŝi jam ploris pri tiu ekzekuto. Nun revenis ploroj. Ŝi silentis.

Ludoviko ŝin komprenis. La tutan dramon li divenis. Tuj la patron li nur petis redoni la promesparolon. Urĝas libereco. Nepre lin vokas certa devo. Li nur promesos tion al si mem, ke al neniu li parolos pri sia celo kaj laboro, ĝis li finos universitaton.

Fakte ne tro grava estis la perdiĝo de l' skribaĵoj. Efektive li memoris ĉion parkere. Kun fervoro li refaris sian verkon.

Sur kajeroj de aŭgusto 1881 reaperas preskaŭ sama lingvo kiel en 1878. Tamen estis jam progreso. La bela balado de Heine „En sonĝo“ estis jene tradukita el germana:



Titolpaĝo de kajero Zamenhofa, 1881

*Mo bella princino il sonto vidá
 Ko žuoj malseŝaj e palaj,
 Sul dillo, sul verda no koe sidá
 Il armoj amizaj e kalaj.
 „La kron' de ta padro fio pu mo esté,
 La ora, la redža ra sello!
 La skepro diantiza, rol mo ne volé,
 Tol mem koj volé mo, ma bella.“
 „To et ne estebla“, ŝo palla a mo,
 „Kor et si la tombo kuŝé mo
 E koj i la nokto vioné mo a to,
 Kor tol fe prekale amé mo!“*

Dum ses jaroj Zamenhof laboris ĉiutage, bonigante kaj provante sian lingvon. Li tradukis pecojn el aŭtoroj diverslandaj. Li skribis verkojn originalajn. Li laŭte legis al si la skribitajn paĝojn. Multaj formoj ŝajnis bonaj teorie, sed praktiko montris ilin maloportunaj. Jen tio estis peza, kaj ĉi tio malbelsona.

„Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭi, korekti, kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj kiel ekzemple la universala prepozicio *je*, la elasta verbo *meti*, la neŭtrala, sed difinita finiĝo *aŭ*, k.t.p., kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekzemple mi devis forĵeti kelkajn nebezonaĵajn sufiksojn.“²

Dum tiu puriga laborado ankaŭ foriĝis el la lingvo kelkaj latinaj radikoj, kiel ekzemple *anno* kaj *diurno*, kaj anstataŭiĝis per *jaro* kaj *tago*. Efektive *-ano* jam estis sufikso kun senco malsama, kaj aliflanke Zamenhof ne volis vortojn kun duobla litero. *Diurno* tre malbele sonis en kunmetitaj vortoj kiel *ĉiudiurne* aŭ *diurnmeze*, kaj ankaŭ estis internacia fakte nur por malgranda nombro da homoj kleraj, kiuj konas latinan lingvon aŭ tiajn vortojn francajn kiel *diurne*, neniam uzatajn de l' popolo. Dume *tago* estas almenaŭ tuj konata de pluraj grandaj popoloj per uzado ĉiutaga, do fakte multe pli internacia. Same plibelsona *kaj* el greka lingvo anstataŭis *e* latinan, ne sufiĉe klaran al oreloj por dividi frazojn sen konfuzo.

Kiam poste eksteruloj volis „perfektigi“ la vortaron, ili ofte nur revenis al unua formo, kaj nur marŝis malantaŭen sur la vojo jam paŝita de viro pli sperta kaj pli zorga. Teorie diris ili, „tiu formo estus certe pli scienca ol ĉi tiu“. Ankaŭ Zamenhof jam trovis samon antaŭ ili, sed multjara praktikado vidigis al li gravan maltaŭgecon de l' unua kaj neceson ĝin forigi per plibona.

Ke „genio estas longa pacienco“, kiel kantis Viktor Hugo, tion montris la ses jaroj de senĉesa polurado per provado. En infanaj jaroj Zamenhof fervoris por muziko. Li ludis fortepianon, kaj li ŝatis kanti. Tial harmonio ĉiam regis lian guston.

Ne li kredis, ke sufiĉas gramatiko kaj vortaro por vivi lingvon. Ĉiu malgracio aŭ pezeco en la frazoj lin akre suferigis. Longe li plendadis al si mem, ke la lingvo ne sufiĉe „fluas“. Tial li komencis nun eviti laŭvortan tradukadon el tiu aŭ alia lingvo. Li penis rekte pensi en la nova.

Iom post iom ĝi ekiris mem. Ĝi malpeziĝis. Ĝi pli rapidis. Ĝi jam ĉesis esti ombro de l' ceteraj. Ĝi ricevis sian vivon, sian spiriton, sian karakteron propran. Ĝi nun dolĉe puŝis for la influojn de l' ekstero. Ĝi jam fluis tiam, flekseble, gracie, kaj „tute libere, kiel la viva gepatra lingvo“.

Tiam estis la vera naskiĝo de la lingvo internacia. Ĉar kiel helpus la homaron senviva kolekto da vortoj? Kiom ĝi valorus, eĉ kun aprobo de naŭdek scienculoj? Ĉiu tirus siaflanke. Mankus fundamento. Ne estus ia stilo komuna. Ne ekzistus ia kutimo por reguligi liberecon. Kontraŭe, pro Zamenhofa pacienco kaj genio la lingvo jam vivis, kiam ĝi aperis. En si ĝi jam portis certan forton, ĉar granda homo ĝin uzadis. Gramatiko kaj vortaro estis ja sciencaj kaj tial

² Letero al Borovko.

nepersonaj, krom elektoj aŭ preferoj de finiĝoj aŭ vortetoj. Sed la spirito kunliganta, la stila fundamento, jam estis sigelitaj per mano tre persona. En ĝin Zamenhof metis multon el si mem. Per ĝi li esprimis novan senton, novan homan sopiradon.

Impresanta estis lia personeco, modesta pri si mem, sed obstina pri la celo. Ĝi simbolis revon de multaj koroj nekonataj. Tial ĝi influis poste l' unuan rondon de l' verkantoj en la nova lingvo.

Nacia literaturo komenciĝas ĝenerale per milita poemaro. Ĝian stilon kaj spiriton signas fama kantisto pri bataloj. Okazis male por lingvo Zamenhofa. En pacaj kantoj ĝi eliris al publiko. Pri homa refratiĝo ankaŭ skribis la sekvantoj de la Majstro.

Ankaŭ propran animstaton li esprimis. Dum ses jaroj li restadis sub silento. Ĝi estis tempo malfacila. Al neniu li parolis pri sia laborado. La kaŝeco lin turmentis. Tial li malŝatis eliradi. Nenie li ĉeestis, en nenio partoprenis. En rondoj societaj li sentis sin fremdulo. Tiel pasis for la plej belaj jaroj de la vivo, la studentaj, malgaje kaj dolore. Tiun fajron kaj suferon sub silento li pentris per tiama la versaĵo:

MIA PENSO

Sur la kampo, for de l' mondo, antaŭ nokto de somero

Amikino en la rondo kantas kanton pri l' espero.

Kaj pri vivo detruita ŝi rakontas kompatante —

Mia vundo refrapita min doloras resangante.

„Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, kial tia senmoveco?

Ha, kredeble rememoro el la kara infaneco?“

Kion diri? Ne ploranta povis esti parolado

Kun fraŭlino ripozanta post somera promenado!

Mia penso kaj turmento, kaj doloroj kaj esperoj!

Kiom de mi en silento al vi iris jam oferoj!

Kion havis mi plej karan — la junecon — mi ploranta

Metis mem sur la altaron de la devo ordonanta!

Fajron sentas mi interne, vivi ankaŭ mi deziras;

Io pelas min eterne, se mi al gajuloj iras...

Se ne plaĉas al la sorto mia peno kaj laboro,

Venu tuj al mi la morto, en espero — sen doloro!

Ĉapitro V. Doktoro Esperanto

Tamen iam „l' amikino en la rondo“ divenis la misteron. Klara Zilbernik, filino de Kovna komercisto, renkontis Zamenhof ĉe bofrato sia. Sprita, gaja, energia, kaj bonkora, ŝi atente rimarkadis la junulon silenteman kaj timeman. Granda frunto pura kaj pensema; sub okulvitroj rigardo luma kaj profunda.

Amo venis inter ili. Unu tagon li konfesis al ŝi siajn du sekretojn. Ŝi komprenis, kaj decidis partopreni lian vivon de sindono.

Ŝi povis antaŭvidi ekzistadon malfacilan, kaj tial agis tre kuraĝe. La diplomon kuracistan Ludoviko Zamenhof ricevis jam du jarojn antaŭ tio; sed inter 1885 kaj 1887 li vane serĉis tujan vivrimedon. De loko al loko tre malĝoje li provadis

trovi la sufiĉan klientaron. La komenco estis neprospera. Ankaŭ lia modesteco kaj sentemo lin malhelpis. Tre ŝatata de malriĉaj malsanuloj, li ne sciis gajni grandajn sumojn. En Plock unu vesperon oni lin venigis en domon de riĉuloj. Kuŝis maljuna sinjorino, kaj apude tri doktoroj. Stato malespera. Post du tagoj ŝi pereis. Al la kvar vokitaj kuracistoj la gefiloj sendis altan pagon. Zamenhof rifuzis sian. Kial preni monon, kiam mortis la kliento?

En Vejsieje, la urbeto litva, li ĉeestis morton de bubino. Febro ŝin bruligis for. Pro doloro la patrino malfeliĉa preskaŭ frenezigiĝis. Dum monatoj poste li aŭdadis ŝiajn plorojn kaj ĝemadon. Li decidis lasi ĝeneralan praktikadon kaj elekti fakon okulistan.

Tial li vojaĝis al Vieno por studadi oftalmologion ĉe speciala kurso. En aŭtuno 1886 li revenis Varsovion al gepatra hejmo. Tie li malfermis akceptejon kiel okulisto. Dum sama vintro li ekkonis sian fianĉinon kaj ricevis kuraĝigon por eldoni sian verkon al publiko.

Jam de jaroj li ja serĉis eldoniston. Klopodo sensukcesa. Neniu volis riski monon. Ankaŭ tiel li ekspertis la maldolĉon de l' financa flanko en la mondo. Nova turmento komenciĝis.

Tamen urĝis aperigi lian lingvon. Dum silente li ĝin perfektigis, ekfloris okcidente „Volapük“ de l' abato Ŝlejer el Konstanco. La vortaro estis malfacila kaj arbitra. Dum longa tempo Zamenhof nenion sciis pri tiu provaĵo. Kiam ĝia famo lin atingis, unue li tre ĝojis, sed konstatis poste, ke la solvo mem ne taŭgas. Baldaŭ la movado jam malkreskis. Multaj homoj malkuraĝis, kaj forlasis la aferon. Urĝis montri al la mondo, ke la celo restas prava. Nur la sistemo estis malbona. Lingvo devas esti ja internacia kaj vivanta, ne arte fabrikita.

Tiam intervenis homo tre helpema. Li estis la patro de Klara Zilbernik. Lia filino fianĉiĝis en printempo³ kun D-ro Zamenhof. La juna scienculo kaj idealisto tre plaĉis al li. Pri lia plano li demandis lin. Grandega la projekto! Nobla la celo! Simpla komercisto li mem estis, sed amanto je ideoj. Je kio do utilis gajni monon kaj ŝpareti? Ĉu ne por igi vojon pli facila al unu pli klera ol li mem kaj pli valora por homaro?

Multaj patroj en lia loko malkonsilus la filinon. Nur dirus ili: „Veran viron mongajnantan kaj realan vi elektu, ne revulon!“ Tiel ili paroladus, frizante la lipharojn. Malsame Zilbernik: „Geniulo estas via Ludoviko“, li diris; „filineto mia, vi havos sanktan taskon. Ĵaluze ankaŭ mi dezirus helpi lin.“

Tial proponis la bopatro, ke la edziĝo jam fariĝu en somero, kaj antaŭe jam presiĝu je lia kosto la libretoj pri mondlingvo. Tiel okazis. Dum du monatoj presprovaĵoj atendadis ĉe la cenzuristo. Feliĉe tiu estis bonkonato de la patro de Zamenhof. Fine la 14. de julio⁴ li allasis la permeson al presisto. La verko kredeble ŝajnis al li sendanĝera naivaĵo. La aŭtoro estis maltrankvila. Unuflanke malpacienco, aliflanke timo lin agitis.

„Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono, kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se ĉi tiu publiko vidas en li

³ La 30. de marto 1887.

⁴ 1887.

fantaziulon, homon, kiu sin okupas je ‘flankaj aferoj’; mi sentis, ke mi metas sur la karton tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon, kaj . . . mi transiris Rubikonon.“

En tiaj tagoj Zamenhof verkis versaĵon tre mallongan: *Ho, mia kor’!* Ĝi sonas iom kiel spirado malfacila de homo suprenkurinta kvin etaĝojn de ŝtuparo kaj staranta antaŭ pordo halte:

Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile,

El mia brusto nun ne saltu for!

Jam teni min ne povas mi facile,

Ho, mia kor’!

Ho, mia kor’! Post longa laborado

Ĉu mi ne venkos en decida hor’!

Sufiĉe! trankviliĝu de l’ batado,

Ho, mia kor’!

La unua libreto aperis en la rusa lingvo. Baldaŭ poste sekvis eldonoj pole, france, germane kaj angle. Ĉiuj entenis saman enkondukon, tekstojn en lingvo internacia: Krista preĝo *Patro nia*, El Biblio, Letero, Versaĵoj, plenan gramatikon el dek ses reguloj, dulingvan vortareton el naŭcent radikoj. Ankaŭ estis aliĝiloj kun promeso tuj komenci la lernadon, kiam dek milionoj da personoj estos same promesintaj. Per deklaro sur la dua paĝo la aŭtoro jam forlasis ĉiajn rajtojn siajn, ĉar „lingvo internacia, kiel ĉiu nacia, estas komuna propraĵo“. La tuta verko estis subskribita per belsenca pseŭdonimo: „Doktoro Esperanto“.

La 9. de aŭgusto⁵ Zamenhof edziĝis, kaj enloĝis tre modestan ĉambrareton sur la strato Przejazd 9, en Varsovio. Tie kun edzino li komencis dissendadon de l’ broŝuro al gazetoj kaj personoj ĉiulandaj. Ŝi skribadis nomojn kaj adresojn, enpresigis anoncetojn en ĵurnaloj. Tiel pasis la monatoj de l’ komenca kunvivado. Feliĉaj, kiuj scias eternigi sian amon per tuja semo de komuna idealo.

Kiel estos akceptita la libreto? Ĉu ĝi simple falos en silenton kaj forgeson? Ĉu homoj blinde eĉ ne legos frukton de dekjara laborado? Minacis dubo malespera. En tiaj horoj ofte kuŝas en la manoj de virino, ĉu blovi kuraĝiĝon sur flameton fidan aŭ ĝin estingi per ploretoj de plendado bagatela. Granda ŝi estas, se ŝi gardas la flamon.

Unu post unu ekvenis respondoj. Demandoj, konsiloj, aproboj, aŭ fervoraj leteroj. Eĉ kelkaj estis jam skribitaj en la nova lingvo. Ĝi fariĝis do vivanta, ĉar uzata. Baldaŭ multaj anonciĝis aliĝantoj. Formiĝis rondo familia. Duoble ĉesis la soleco Zamenhofa.

Estis por li granda ĝojo, senti sin de tiam ĉirkaŭata de fervoraj samideanoj. Eĉ ankoraŭ pli kontente li pensis, ke la lingvo jam trovis nun anaron, kaj povus baldaŭ kreski per si mem. Laŭ lia espero „la aŭtoro tiam tute foriros de la sceno, kaj estos forgesita. Ĉu mi post tiam ankoraŭ vivos, ĉu mi mortos, ĉu mi konservos la forton de mia korpo kaj animo, ĉu mi ĝin perdos, la afero tute ne

⁵ 1887.

dependos de tio; kiel la sorto de ia vivanta lingvo tute ne dependas de la sorto de ĉi tiu aŭ alia persono“.

Tiel li skribis en la *Dua Libro*, kiun li eldonis nur en la lingvo mem, jam en komenco de la jaro 1888. Kun multaj aliĝintoj li korespondadis ja persone. Sed plej ofte li devis rediradi pri la samaj temoj. Tial li respondis kolektive per unu broŝuro ĝenerala.⁶

„Mia profunda kredo je la homaro min ne trompis“, li skribis en antaŭparolo, „la bona genio de l’ homaro vekigis: de ĉiuj flankoj al laboro ĉiuhoma venas junaj kaj maljunaj . . . viroj kaj virinoj rapidas porti iliajn ŝtonojn por la granda, grava kaj utiliga konstruo.“

Ne nur kun Zamenhof korespondis la novaj adeptoj, sed ankaŭ inter si. Antono Grabowski tradukis jam verkojn el Goethe kaj Puŝkin.

En oktobro 1889 aperis la unua adresaro, kun mil nomoj diverslandaj. Laŭ uzado ĝenerala, la „lingvo de Esperanto“ baldaŭ nomiĝis „Esperanto“ tute simple. Al ĝi konvertiĝis en Nurnbergo Leopold Einstein kaj la tuta klubo mondlingvista. Ili fondis saman jaron gazeton monatan *La Esperantisto*. Ĝi anoncis grupojn en Sofjo kaj Moskvo. Kreiĝis internacia movado.

Samtempe la maldolĉo de l’ eksteraj cirkonstancoj returmentis la doktoron. Klientaro ne plenigis lian akceptejon. De l’ bopatro li ricevis monon por presigi la broŝurojn. Sed por hejmo li ne volis akcepti lian helpon. Li deziris nepre perlabori vivrimedon. Jam naskiĝis gefiletoj Adamo kaj Sofio. La edzino reveturis Kovnon en loĝejon de l’ gepatroj. Dume la juna okulisto denove serĉis praktikadon en alia loko. En Ĥerson, apud Nigra Maro, li klopodis sensukcese. En marto 1890 ambaŭ retroviĝis en ĉefurbo pola.

Tie Zamenhof ekprenis sur sin la eldonon de *La Esperantisto*, laŭ deziro de l’ samideanoj. Preskaŭ ĉiuj estis malriĉuloj, kaj nur centu pagis abonprezon. Post kelka tempo li forspezis ĉiujn fortojn kaj rimedojn siajn. Kun edzino kaj infanoj li troviĝis en premanta malfacilo. Ĝuste tiam tre malsanis la patrino, kiun amis li el tuta koro. Ĉagreno lin sufokis. Ĉio ŝajnis nigre malespera. La sorto minacis senigi lin je patrino adorata kaj ankaŭ je lia vivcelado. Se li mem malaperus, la lingvo povus tamen prosperadi, li opiniis. Sed, se li haltigos la presadon de l’ organo centra, baldaŭ disvelkos la tuta progreso. „Se la trunko ĉesos vivi“, li skribis en alvoko lasta, „ĉiuj esperoj estos perditaj. La esperantistoj devas zorgi. . . . Mia situacio atingis lastan gradon de neebleco.“

Tiam aperis amiko en la plej nobla senco de la vorto. Termezuristo laborema kaj modesta estis W.H. Trompeter, el Schalk en Vestfalia. Esperantisto de l’ unua horo, li komprenis la grandecon de Zamenhof kaj de lia celo. La tuta afero, tiel grava por homaro, naĝis kiel nukseto sur la vasta maro. Malgranda, malforta, nekonata, se ĝin dronigus ondeto, la mondo eĉ ne sciis. Sed se ĝi vivos, kia mirinda kreskaĵo disflorados iam el nukseto kaj etendos bonfarantan foliaron super la popoloj fratigitaj!

Ni savu la nukseton! decidis Trompeter. El sia propra salajro li elĉerpos. Kvankam neriĉa, li proponis anonime certan sumon por daŭrigi la gazeton dum

⁶ D-ro Esperanto: *Dua Libro de l’ Lingvo Internacia*. Kajero n-ro 1, Varsovio 1888 (Cenzuro 18/30 januaro).

tri jaroj. Al redaktisto li dediĉis centmarkan monatpagon. Ĝis 1894 la vivo estis certigita. „Sen Trompeter nia afero tute ne ekzistus“, parolis Zamenhof en Bulonjo. „Neniam parolante pri si, postulante por si nenian dankon“, li estis plej fidela kaj sincera konsilanto. Inter tiuj maloftaj viroj li estis, kiuj scias oferi eĉ parton de sia necesaĵo por helpi geniulon.

Dum tri jaroj Zamenhof do povis pace laboradi; sed novaj malfeliĉoj lin ekfrapis. En aŭgusto 1892 jam mortis la patrino tiel kara. Kiu vartis lin bubeto, kiu glatis lian kapon de knabeto, kiu faris lin sentema kaj homama, tiu ĉi nun estis for. La bato lasis ĉe li vundon neflegeblan. En 1894 la demando materia refariĝis premanta. Kun sia famiieto la Doktoro devis transloĝi al Grodno.

Kvar jarojn li restadis tie. Granda ĝojo kaj ĉagreno lin atendis. Dum tuta juneco li fervore legis novajn verkojn de Tolstoj. Nun la famo de l' granda Ruso disvastiĝis tra la mondo. Kontraŭ ĵaluzo kaj perforto li admonis la homaron. Lia nobla voĉo sonis, vokante ĉiujn homojn al amo kaj fratiĝo. Post brila novelista kariero, la riĉa grafo konvertiĝis al simila idealo, pri kia Zamenhof jam vivis de post infaneco. Li forlasis nobelaron, kaj sin turnis al simpleco. La vilaĝanoj fariĝis liaj fratoj. Al nacioj kaj eklezioj li riproĉis malamon inter si.

Kiu pli bone povus ja konsenti kun la Bjalistoka modestulo? Pro sia timemo delikata, li ne kuraĝis trudi sin al Tolstoj. Nur inter ceteraj li sendis al li la libreton en 1888. Respondo ne venis. La semo tamen estis ĵetita. Post ses jaroj ĝi leviĝis antaŭ la publiko. La popola rusa eldonejo „Posrednik“ interesiĝis pri Esperanto, kaj petis opinion de la fama pensulo. „Ricevinte antaŭ ses jaroj esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn skribitajn en ĉi tiu lingvo“, respondis Tolstoj, „mi post ne pli ol du horoj da okupado povis jam, se ne skribi, almenaŭ libere legadi en la lingvo. . . . Mi vidis multfoje, kiel homoj rilatis malamike nur dank' al materiala malhelpo je reciproka komprenado. La lernado de Esperanto kaj ĝia disvastigo estas do sendube kristana afero, kiu helpas al kreo de la Regno de Dio, kio estas la ĉefa kaj sola celo de la homa vivo.“ (*Jasnaja Poljana*, 27. aprilo 1894.)

Tia parolo estis granda kuraĝigo. La letero enpresiiĝis en *La Esperantisto*, kaj varmigiĝis entuziasmon. Ankaŭ aperis pli malfrue, en la dua numero de 1895, tradukaĵo el Tolstoja *Kredo kaj Prudento*. Pro tio la rusa cenzuro malpermesis la gazeton en la Imperio. Terura bato: ĉar tie ĝi havis la plej multajn abonantojn. La elirado devis ĉesi. Oficiala elefanto paŝpremis nur muŝeton. Sed tiel mortis la ligilo de l' Esperantistoj. Malĝojo kaj mallumo regis en la rondeto. Dume Zamenhof denove baraktadis kun akraĵoj de l' vivado.

Sur alia tero, feliĉe, grenero semita elkreskis. Jam en decembro saman jaron eliris *Lingvo Internacia*. Upsala Klubo Esperanta eldonis la gazeton en Svedujo. De post tiam la movado ne haltis iam plu.

El la romano Vivo de Zamenhof

La vojo

L. L. Zamenhof

Tra densa mallumo briletas la celo,
al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sortoj, nek mokoĵ de l' homoj,
ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante,
ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, –
ni semas kaj semas konstante.
„Ho, ĉesu!“ mokante la homoj admonas, –
„Ne ĉesu, ne ĉesu!“ en kor' al ni sonas:
„Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
se vi pacience eltenos“.

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
velkantajn foliojn deŝiras,
ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
ĝin jam ne timigos la vento, nek staro,
obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
al cel' unufoje signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco –
jen estas la signoj, per kies potenco
ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
atingos la celon en gloro.

Sto let od narození Arnošta Kavky

Tomáš Břicháček

U příležitosti stého výročí narození swingového zpěváka a hudebního skladatele Arnošta Kavky zařazujeme krátký medailonek.

Arnošt Kavka přezdívaný někdy „**Doktor Swing**“ se narodil 4. března 1917. Hudbě se začal aktivně věnovat už za gymnazijních let. Učil se hře na altsaxofon a především pak na bicí u tehdy věhlasného bubeníka Laco Ollaha. V sedmnácti letech založil vlastní studentský orchestr Black and White, jehož členy byli mimo jiné Leopold Korbař, Jan Rychlík nebo Ladislav Habart. Jako bubeník pak působil v několika souborech, naposledy v tehdy ještě amatérském souboru Karla Vlacha Blue Boys. Právě ve Vlachově souboru se postupně z bicích přeorientoval na zpěv. Učil se technice zpěvu u několika učitelů, mimo jiné také krátce v belgickém Ostende u známého orchestru Roberta de Kerse, kde získal dovednosti ve zpěvu na mikrofon. Vedle Vlachova souboru v předválečných letech zpíval i s dalšími kapelami jako byl orchestr Harryho Ostena či Jaroslava Maliny.

Začal také studovat práva, nicméně tato studia přerušilo uzavření českých vysokých škol nacisty v listopadu 1939.

Když Karel Vlach v roce 1939 získal kapelnickou koncesi a vytvořil profesionální orchestr, Kavka se stal jeho stálým zpěvákem a byl jím až do roku 1944. Zpíval zde sólově i spolu s dívčím triem Sestry Allanovy. Velké množství písní bylo nahráno na gramofonové desky. Právě toto období představuje zřejmě vrchol v hudební kariéře tohoto hudebníka, která pak měla trvat a postupně dohasínat ještě více než čtyři desítky let. Jeho zpěvní projev v tomto období lze charakterizovat jako tenor nosového zabarvení s často poměrně exaltovaným přednesem.

Kavka se už v tuto dobu proslavil nejen jako hudebník, ale také jako recesista. Svými bláznivými kousky, které snad často šly za hranice vkusu, způsobil mnoho pozdvižení.

Během války se vyučil knihkupcem a nakladatelem v podniku R. A. Dvorského, který mu poskytl zázemí a ochránil ho tak před nuceným nasazením. Kavka měl problémy s nacistickými rasovými zákony, podle kterých byl považován za židovského míšence. V roce 1944 byl nakonec zatčen gestapem ve Zlíně přímo při jednom z koncertních vystoupení. Zbytek války pak strávil v lehčích koncentračních táborech, přičemž z posledního z nich se mu podařilo na konci války uprchnout.

Po válce se Kavka už nevrátil do Vlachova orchestru, ale stal se sám kapelníkem, a dokončil přerušené právnické studium. Ve svém malém (maximálně osmičlenném) jazzovém bandu angažoval postupně řadu talentovaných hudebníků, mj. Ferdinanda Havlíka a Miloslava Kefurta. Po roce 1948 se s tímto souborem mimo jiné snažil vyhovět požadavkům doby a hrát socialistický „jazz“ na lidové motivy (často také v ruštině), což se nicméně neujalo.



Na začátku 50. let byl po bouřlivějších vystoupeních v západním stylu v Lucerně a po vystoupení, na kterém kapela hrála mj. melodie z oper v jazzové úpravě, byla Kavkovi zakázána činnost a musel absolvovat znovu zkoušky. V první polovině 50. let pak hrál se zmenšeným souborem jen v malých vinárnách.

Po válce se uplatňoval také jako hudební skladatel. Už za války napsal melodii k písni Šeptám do ouška, která se stala poměrně známou. Po válce pak komponoval ve větší míře. Řada písní, ke kterým napsal hudbu, byla nahrána na deskách Supraphonu (kupř. Lýdie, Móda, Kouzelný zámek).

V mírně uvolněné atmosféře konce 50. let a v 60. letech opět mohl vystupovat v médiích, nahrál dokonce řadu písní na desky. Neobnovil však už větší orchestr. Jeho soubor se zmenšoval, až hrál nakonec sám jako estrádní umělec. Doprovázel se přitom na soubor nástrojů, kterému říkával „kombajn.“ V šedesátých a sedmdesátých letech takto podnikl řadu domácích i zahraničních koncertních turné (zejm. v Polsku a Bulharsku). Na začátku 70. let vystupoval na americkém zaoceánském parníku.

Se svým „kombajnem“ hrál a zpíval ještě v 80. letech. Občas se objevil v Televarieté a jiných estrádách. Československá televize v roce 1987 připravila pořad k jeho 70. narozeninám.

Zemřel 2. května 1994.

Psáno pro CS Retro Music

Dodejme, že fanoušci Arnošta Kavky nedávno vytvořili internetové stránky www.arnostkavka.cz.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7